



ESPÉRANTO-NORD

Fédération d'espéranto des régions Nord-Pas-de-Calais & Picardie

Protokolo de la ĝenerala asembleo en Halluin, la 14an de Aprilo 2013

Arlette Plutniak, prezidantino de la Norda Federacio bonvenigas la kongresanojn. Ĉeestas 40 federacianoj, kaj 4 sendis rajtigilojn. La korumo estas atingita.

- Agadraporto

A.P. legas la agadraporton (traduko ne necesas ĉar ĉiuj ĉeestantoj senprobleme komprenas Esperanton). A.P. parolas pri nia amikino Nicole Bécant kiu ĵus mortis. Nicole multe laboris por nia movado, okupiĝis pri la kongreso en Wavrans-sur-Ternoise lastjare, zorgante pri renovigo de la tombo de Grosjean-Maupin, organizante viziton al preĝejo kie ŝia patro multe laboris... Sekvas minuto da silento por Nicole. Arlette Plutniak verkis artikolon pri Nicole kiu aperos en la venonta Norda Gazeto.

La arasanoj parolas pri siaj kursoj. Ĉirkaŭ 19 homoj kunvenas ĉiusemajne. Kvar instruantoj siavice instruas. Anstataŭ komencantoj, komencintoj... estas nur partoprenantoj, kaj gravas varieco kaj diverseco.

La agadraporto estas unuanime aprobita.

- Financa raporto

Xavier Vilain legas la financon raporton. Ĝi estas ankaŭ unuanime aprobita. La federacio tute ne havas financajn problemojn (dank'al la malavara donaco de sinjoro Labit). Ĉar estas iom tro da mono en la konto, Jean Hennebert proponas ĝiri sumon al la ŝparkonto kaj la propono estas akceptita.

- Niaj projektoj

A.P. parolas pri la **Universala Kongreso en Lille: Lille 2015**. Ŝi opinias ke estus pli oportune ke lillano estu prezidanto de nia federacio. Xavier Dewidehem parolas pri la decido fare de UEA akcepti la kandidatecon de Lille. X.D, Michel Dechy kaj Julia Hedoux preparis la dosieron pri kandidateco. La laboro estos grandega, kaj ĝi devos esti organizita kun kiel eble pli da homoj. Ankaŭ gravas komunikado kun Esperanto-France. Ni esperas entuziasman kreskadon de la partoprenantoj-helpantoj.

Marcel Delforge demandas ĉu ni jam havas ideojn pri ekskursoj. X.D. respondas ke duontagaj ekskursoj estas antaŭviditaj (urbo mem, ĉirkaŭajo, Louvres-Lens...) kaj ankaŭ tuttagaj ekskursoj (Bulonjo-ĉe-marjo kie ni esperas solenaĵojn kiel en 2005...

Roland Rotsaert, el Bruĝo, proponas ke la biblioteko de Saint-Omer estu en la listo de kontaktoj pri la kongreso, ĉar en la urba biblioteko estas kolektaĵo de Esperanto-libroj, sed pro renovigaj laboroj, la kolekto ne plu estas alirebla. Eble la novaĵoj pri la kongreso emfazos la gravecon de tiu kolekto.

Laurent Zibell demandas ĉu eblas proponi temojn, ideojn, programerojn... X.D. respondas ke tion fiksas UEA, kaj ke dum kongreso ĉiam okazas difinitaj programeroj, nome: jarkunvenoj de diversaj asocioj kaj de fakaj asocioj de UEA, kleriga lundo kun multe da atelieroj kaj prelegoj, spektakloj (nacia vespero...). En la retejo de UEA eblas informiĝi pri tiuj kongreseroj.

- Renovigo de la komitato
Povus esti pli da komitatanoj (ĝis 20), sed malfeliĉe neniu nova kandidatiĝas.
- Diversaĵoj

Marianne Dunlop parolas pri enkonduko de Esperanto-kursoj en la universitato de Araso.

Vincent (el Marseilles-en-Beauvaisis) provas starigi kurson en la *Université Tous âges*

Michel Dechy klarigas ke estis pli malfacile por li starigi kurson en UTL ĉi-jare, ĉar li ne ricevis la eblecon taŭge reklami pri la kursoj.

Jean Hennebert demandas ĉu ni parolos pri la eventuala komuna aliĝo al kluboj, federacioj, kaj UFE. Claude Longue-Épée respondas ke ni parolos pri tio venontan jaron. Nuntempe estas nur interna debato.

Redaktis Katja Boen, sekretariino de la Norda Federacio